Esperanto

## Kopenhagaj vidindaĵoj

1. Amaliehaven (Ĝardeno de Amalie)
La fondinto estis la dana firmao A.P.Möller.Arkitekto estis la belgo Jean Delogne.La ĝardeno estas farita en baroka stilo,ĝi estis donaco al reĝino Margrethe fare de la firmao.Kvar latunaj kvadrataj kolonoj kaj du ornamitaj latunplatoj kiel akvofaloj estas faritaj de la itala arkitekto Arnoldo Pomodoro, 1983.

2. Amalienborg (Kastelo de Amalie)
La dana reĝo Frederiko la V-a (1746-1766) ordonis ke oni konstruu "Frederiksstad"-urbo de Frederiko,omaĝe al la 300-a datreveno (1448-1748) de lia familio sur la dana trono.Ĝi konsistas el kvar rokoko-stilaj palacoj,preĝejo,luksaj domoj kaj rajda statuo de la reĝo en la centro de la placo. Arkitekto Nikolai Eigtved faris la desegnojn,kaj ĉiuj konstruaĵoj estis faritaj laŭ lia direktivo.
a. La okcidenta palaco apartenis al grafo Gottlob Moltke,marŝalo de la reĝa Kortego.
b. La norda palaco apartenis al grafo Kristian Levetzau,generalo kaj la ĉefo de la Sekret-ministra-konsilantaro.
c. La orienta palaco apartenis al barono Joachim Brockdorff,membro de la Scienca Akademio.
d. La suda palaco apartenis al barono Severin Lövenskjold,kiu pro malbona ekonomio vendis ĝin al Sophie Schack,vidvino post grafo Hans Schack membro de la Sekreta Konsilantaro.
Hodiaŭ Amalienborg estas ĉefloĝejo de la reĝa familio.

3. Amagertorv (Placo de la insulo Amagero)
Ardeo-fontano starigita ĉi tie en la jaro 1894 de arkitekto Vilhelm Bissen la fondinto de kopenhaga Plibeliga-Asocio.La domo n-ro 6 estas el la jaro 1616.Dum periodo ĝi estis en la posedo de la urbestro Matias Hansen, ĝi estas konstruita en renesanca stilo.

4 Aleksander Nevski kirke (Preĝejo de Aleksander Nevski)
Rusa-ortodoksa preĝejo.Konstruita dum la jaroj 1881-1883 de arkitekto Davi Ivanoviĉ Grimm.Caro Aleksandro la III-a ordonis ke oni konstruu tiun preĝejon honore al sia edzino carino Maria Fiedorovna,filino de la dana reĝo Kristiano la IX-a.Ĝi estas konstruita laŭ la malnova rusa stilo kiu regis dum la XVII-a jc. en Moskvo.Sur la fasado oni vidas Aleksander Nevski (1218-1263),la rusan heroon,kiu venkis la svedojn apud la rivero Neva (1240), kaj germanajn kruckavalirojn ĉe Balta Maro (1247).

5. Assistens kirkegard (Asista tombejo)

Fondperiodo: 1757-1760.Antaŭa tabakplantejo.Tomboj de pluraj famaj danoj Ekzemple la fabelisto Hans Kristian Andersen,la filozofo Sören Kierkegaard la lingvisto Rasmus Rask kaj la fizikisto Hans Kristian Örsted.Maŭzoleo de Peter von Scholten,kiu en 1848 ekssklavigis la negrojn en la Danaj Virgino-Insuloj en la Karaiba Maro.

6. Botanisk Have (Botanika Ĝardeno)

Fondita de Jacob Jacobsen,kreinto de la bierfarejo Carlsberg.La ĝardenon projektis kaj faris ĝardena arkitekto A.Flindt dum la jaroj 1871-1874.

7. Börsen (Borso)

Kristiano la IV-a(1588-1648)konstruigis la borson dum la jaroj 1619-1622. La arkitektoj estis la fratoj Lorenz kaj Hans Steenwinckel.Komence estis magazenoj en la teretaĝo,kaj en la supra etaĝo butikoj.Dum la periodo 1857-1972 la konstruaĵo funkciis kiel borso.La turpinto el kvar kuntorditaj vostoj de kvar drakoj estas desegnita de L.Heideritter.

8. Carlsberg Bryggerierne (Bierfarejo Carlsberg)

Fondinto:Jacob Jakobsen.La bierfarejo estas konstruita en 1847 laŭ desegnoj faritaj de fondinto.En la jaro 1881 filo de la fondinto Carl kun helpo de arkitekto V.Dahlerup,konstruis novan bierfarejon apude.En 1906 ili unuiĝis. Okcidente estas pordego,kiun subtenas kvar antikvaj marmoraj elefantoj; modelo estis la obelisko el Piazza de Minerva en Romo.La elefantoj portas bele plektitan turon,kiu estas kopio de preĝejo en Rumanio.

9. Charlottenborg (Kastelo de Charlotte)

Estis konstruata dum la jaroj 1672-1683 en baroko stilo.Arkitektoj estis Evert Jensen kaj Lambert van Haven.La unua posedanto estis Ulrik Gyldenlöve (1638-1704),kiu estis guberniestro por la dana reĝo en Norvegio,kaj frato de Kristiano la V-a (1670-1699).La palacon elaĉetis reĝino Charlotte Amalie post la morto de sia edzo Kristiano la V-a.Pro tio oni nomis ĝin laŭ ŝi. En la jaro 1753 Frederiko la V-a (1746-1766) transdonis tiun palacon al la Skulptura kaj Konstrua Akademio.

10. Christiania.

Dum la jaroj1833-1836 oni konstruis kazernon.La soldatoj forlasis ĝin en 19 Ĉar la Kopenhaga Komunumo ne havis planojn rilate al tiuj domoj grupo da homoj,ĉefe junaj,prenis ĝin en posedon sen permeso de la aŭtoritatoj. Plurajn jarojn poste oni deklaris ĝin "sociala eksperimento".

11. Christianskirke (La Kristiana preĝejo)

Konstruata dum la jaroj 1755-1759 laŭ desegnoj de la mortinta (1754)arkitek Nikolai Eigtved.Rokoko stilo,rektangula formo.Areo de la preĝejo estas simpl granda loko kun plata gipsa plafono.Ambono staras sub segment-frontono kaj ripozas sur la joniaj kolonoj el norvega marmoro.La orgeno situas supre la altaro,vid al vide al la reĝa loĝio.

12. Christiansborg slot (Kastelo de Kristiano)

I. Unua kastelo verŝajne ekzistis sur la insulo Holm,inter Selando kaj Amager, sed oni ne scias pri desegnaĵoj de la kastelo.

II. Laŭ la historiografo Saxo episkopo Absalon konstruis en la jaro 1167 novan kastelon sur la insulo Holm kiel defend-kastelon kontraŭ Vendaj marrabistoj kaj por protekti danajn heringojn en la markolo.

III.En la jaro 1368 Lübek-anoj konkeris kaj detruis danan kastelon.Episkopo de Roskilde Peder Lodehat rekonstruis la kastelon kaj nomis ĝin "Kopenhaga Kastelo".Poste Eriko de Pomerujo alkonstruis la "Bluan Turon",kiun plialtig Kristiano la IV-a.Tiu turo estis malliberejo por la reĝa filino Christine, ŝi devis esti tie dum 22 jaroj.

V. Frederiko la IV-a(1699-1730) ordonis ke oni ruinigu la mezepokan kastelon. Arkitekto J.C.Ernst konstruis novan,kaj finis la laboron en 1727. Sed tiu nova kastelo staris nur dum 4 jaroj.La grundo estis tro ŝlima por la peza konstruaĵo.

. En la jaro 1731 Kristiano la VI-a(1730-1746) ordonis ke oni malkonstruu la kastelon de Frederiko la IV-a.Dum la jaroj 1733-1745 estiĝis nova palaco nomata (la unua) Christiansborg,en stiloj viena-baroka kaj franca-rokoka. Tiu palaco ekzistis dum 49 jaroj.En 1794 ĝi forbrulis,escepte de palacaj al

I. Kristiano la VII-a (1766-1808)rekonstruis la palacon dum la jaroj 1803-1828 en klasikisma stilo.Ĝi estis nomata la dua Christiansborg.Arkitekto estis C.F.Hansen.Samtempe oni konstruis la palacan preĝejon en romia stilo. En la jaro 1884 ĉio forbrulis,escepte de la preĝejo.

II.La tria kaj nuntempa Christiansborg-palaco oni konstruis dum la jaroj 1907-1928 en novrokoka stilo.Arkitekto:Thorvald Jörgensen.Materialo:granito. La palaco entenas reĝajn reprezentajn lokalojn kaj la parlamentejon.

13. Christiansborg Slotskirke (Kastela preĝejo)
Estis konstruata dum la jaroj 1803-1808.Arkitekto:F.Hansen.Konsekrita en 1826.La preĝejo evitis la flamojn en la jaro 1884.Sed dum karnevalofesto en 1992 la kupolo forbrulis.Je la falo ĝi detruis grandan parton de la preĝeja interno.Post 5-jara ampleksa riparlaboro la preĝejo denove funkcias.

14 Christianshavn (Haveno de Kristiano)
Ĝi estis konstruata dum la jaroj 1617-1622,fondinto estis Kristiano la IV-a (1588-1648).Oni ramis palisojn en la molan akvogrundon kaj faris firman ter non sur kie oni konstruis loĝ-kvartalon,ĉefe por maristoj.Tiu urbo.kvartalo estis sendependa,havis propran urbodomon kaj blazonon.Ĉi tie alkajiĝis ŝipo kun valoraj varoj el la Ekstrema Oriento.

15. Dantes Plads (Placo de Dante)
Omaĝe al la 600-jara mort-datreveno (1265-1321) de itala poeto Dante Alighieri la Dana-Itala Asocio decidis starigi monumenton kaj nomi la placon honore al li.La 22-an de junio 1922 renkontiĝis Kristiano la X-a (1912-194 kaj Vittorio Emanuele la III-a en Kopenhago.La kolono estas donacita de Ro La statuo montras Beatrice Portnari, lian amatan ĉefpersonon en poemo "La Dia Komedio",kaj estas donaco de la urbo Firenze.

16. De Döves kirke (Preĝejo destinita al surduloj)
Estis konstruita en la jaro 1904.Arkitekto:Emil Jörgensen.En la portala timpanono estas reliefo fare de skulptisto A.Hassel;ĝi montras Kriston kaj infanon.La kontakto inter Jesuo,la infano kaj lia patrino okazas ne per vortoj,sed per karesoj.

17. Domhuset (Juĝejo)
Estis konstruata dum la jaroj 1805-1815.Arkitekto:C.F.Hansen.Klasikisma stilo.Ĝis 1905 ĝi funkciis kiel urbodomo.Super de la pordo oni trovas la surskribon:"Laŭleĝe oni devas regi la landon".Rekonstruita post la incendi en 1795. En la Stutterigade estas arestejo,de kie estas supra trairejo al la juĝejo.

18. Dragespringvandet (Drakofontano)
Estas konstruita en la jaro 1904 de la arkitektoj Thorvald Bindesböll kaj Joachim Skovgaard.En la jaro 1923 oni starigis skulpturon de drako kaj taŭ

19. Frederiksberg Kirke (Preĝejo de la urbo-kvartalo Frederiksberg)
Konstruata dum la jaroj 1731-1732 de la nederlanda arkitekto Felix Dusart. La okangula preĝejo estas farita el ruĝaj brikoj.Interne la preĝejo estas riĉe ornamita per bildoj kaj memortabuloj de famaj homoj.

20. Frederiksberg Runddel (Ronda placo de Frderiksberg)
Origine estis ĉi tie festoplaco por nederlandanoj,kiuj translokiĝis de Amagero al Frederiksberg en la jaro 1651.Ili celebris surplace diversajn festojn kaj aliajn okazaĵojn.

21. Frederiks V statue (La monumento de Frederiko la V-a)
Konstruata dum la jaroj 1752-1771 de la franca skulptisto Jaques-Francois-Joseph Sally.La monumenton donacis Orienta Kompanio,kies membro kaj estrarano estis grafo A.G.Moltke.

22. Frederiks VII statue (La monumento de Frederiko la VII-a)
Estis starigita en la jaro 1873. Skulptisto estis Vilhelm Bissen.
Frederiko la VII-a (1848-1863) subskribis la unuan liberan konstitucion en la jaro 1849.

23. Frederiksberg slot (L'palaco de Frederiksberg)
Ĝi estis konstruita en la jaro 1703. Arkitekto: Ernst Brandenburger. Farita plejparte en itala rokoko-stilo, kiel somera rezidejo por Frederiko la VI (1808-1839). Nuntempe ĝi funkcias kiel oficirlernejo. Enla orienta alo troviĝas preĝejo desegnita de arkitekto von Platen, por uzo de la reĝa familio en la jaro 1710.

24. Frihedsmuseet (La Muzeo pri la Dana Liberecbatalo 1940-1945)
Estis konstruata dum la jaroj 1956-1957 de arkitekto Hans Hansen. Ampleksa kolekto de fotoj, dokumentoj, sabotekipaĵoj, Modeloj de "subtera pr- sejo", de malibereja ĉelo, de armilfabriko ktp. bone atestas pri la okupaci

25. Frue Plads (La Placo de Nia Sinjorino)
Ĉe la placo estis konstruita La Kopenhaga Universitato en la jaro 1479. La fondinto estis Kristiano la I-a (1448-1481).
Sur la placo estas bustoj de famaj personoj ligitaj kun la universitato:

a. Vilhelm Thomsen (1842-1927), lingvoesploristo. Starigita en la jaro 1929. Skulptisto estis Ludvig Brondstrup.
b. J.N.Madvig (1804-1886), filologo kaj rektoro. Starigita en la jaro 1888. Skulptisto estis Vilhelm Bissen.
c. H.N.Clausen (1793-1877), teologo, profesoro pri zoologio, botanikisto. Starigita en la jaro 1880. Skulptisto estis H.Vilhelm Bissen.
d. J.F.Schouw (1789-1852), profesoro pri botaniko. Starigita en la jaro 1857. Skulptisto estis H.Vilhelm Bissen.
e. Japetus Steenstrup (1813-1897), profesoro pri zoologio. Starigita 1898. Skulptisto estis Vilhelm Bissen. La fondinto de la Kopenhaga bestoĝardeno.
f. Niels Bohr (1885-1962), profesoro pri fiziko. Nobelpremiita en 1922. Starigita en la jaro 1965. Skulptisto: Jörgen Gudmundsen-Holmgreen.

26. Gamle Carlsberg (Bierfarejo Carlsberg)
Fondita de Jacob Jacobsen en la jaro 1847, kiu mem faris la desegnaĵojn. Tiu parto estas nomata "malnova", ĉar lia filo Carl konstruis novan fabriko en la jaro 1881, kun helpo de la arkitekto Vilhelm Dahlerup, En la jaro 1905 ili unuiĝis.

27. Gammel Torv (La Malnova Placo)
Dum la tempo de la episkopo Absalon ĝi funkciis kiel bazaro (merkato). Ĉi tie staris la unua urbodomo, kiun detruis Lübekanoj en 1368. La malnova fontano devenas de la jaroj 1607-1609. Arkitekto estis Peter Hoffmann. La statuo simbolas la diinon "Caritas" (mizerikordo). Skulptisto estis Statius Otto.

28. Gefionspringvand (La fontano de diino Gefion).
La plej granda monumento en Kopenhago,el la jaroj 1897-1908.Skulptisto: Anders Bundgaard.Laŭ la norda mitologio la sveda reĝo Gylfe promesis al la diino Gefion tiom da sveda tero,kiom ŝi sukcesos plugi dum unu nokto.Ŝi transformis siajn kvar filojn en bovojn kaj forte laborante dum tuta nokto ŝi elplugis Selandon el Svedio.

29. Höjbro Plads (La Placo de la alta Ponto)
Ĝis la jaro 1795 ĉi tie funkciis elŝipejo por pramoj irantaj al Skanio kaj al Amagero.Post la granda incendio en 1795 la aŭtoritatoj decidis,ke oni konstruu loĝ-domojn,kaj en la centra punkto de la placo oni deziris monumenton de la urbo-fondinto episkopo Absalon (1128-1201).La monumenton oni starigis en 1902.Skulptisto estis Vilhelm Bissen.

30. Holmens Kirke (Preĝejo sur la insulo Holm)
Frederiko la II-a (1559-1588)establis ankroforĝejon,kiun en la jaro 1619 rekonstruis Kristiano la IV-a(1588-1648),kaj destinis ĝin kiel preĝejo. Al tiu renesanc-stila fasado situita kontraŭ la kanalo oni alkonstruis dum la jaroj 1641-1643 du transversaj aloj.Arkitekto:Leonhard Blasiusz. La preĝejo havas krucformon.Super de la enirejo estas jena surskribo:Regna Firmat Pietas.(Dia timo fortigas landon).La altartabulo kaj predika pupitro estas faritaj en malmola baroka lignoskulptaĵo dum la jaroj 1661-1662 de ligno-skulptisto Abel Schröder.

31. Jarmers Plads (La Placo de la princo Jaromar)
En la jaro 1259 Kristoforo la I-a (1252-1259) katenis ĉefepiskopon Jakob Erlandsen en la fuena kastelo Hagenskov.Roskilde-episkopo Peder Skjalmsen loĝanta en Kopenhago ekskomunikigis la reĝon kaj tutan Selandon.La reĝo konkeris Kopenhagon kaj la episkopo fuĝis al la insulo Rügen,tiutempe parto de la Roskilda diocezo.Episkopo Absalon ordonis al sia vasalo la Venda princ Jaromar konkeri Kopenhagon.Jaromar detruis la kopenhagan ŝirman remparon kaj konkeris la urbon.La norvega reĝo Håkon Håkonsøn venis kun sia ŝiparo kaj helpis al la dana reĝo. Post tiu batalo oni plifortigis la ŝirman remparon kaj starigis defendan turon kiu restis ĝis nun.

32. Kastelkirken (La kastela preĝejo)
La preĝejo estas konstruita en la jaro 1710.Arkitekto:W.F.von Platen.
La plafonon kaj pentraĵojn faris Henrik Krock.

33. Det Kongelige Bibliotek (La reĝa Biblioteko)
Oni konstruis ĝin dum la jaroj 1898-1906,en romantika mezepoka stilo.Arkit.: Hans J.Holm.En la ĝardeno staras monumento de filozofo Sören Kierkegaard farita en la jaro 1918 de la skulptisto Carl Aarsleff.La dua estas de Peder Schumacher Griffenfeld,starigita en 1922,Skulptisto:Carl Morten Hansen.

34. Kastellet (La forteso)
Estis fondita en la jaro 1663.Arkitekto:Henrik Rüsse.Supre de la pordo estas videbla la busto de Frederiko la III-a (1648-1670).Skulptisto de la busto estis Francois Dieussart.Krom kazerno estas ankaŭ preĝejo konstruita en la jaro 1704 kun ligita al la preĝejo arestejo.Arkitekto de la preĝejo estis Elias Häuser.

35. Det Kongelige Teater (La reĝa teatro)
Tiu granda konstruaĵo estis farita laŭ desegnoj de la arkitektoj:Vilhelm Dahlerup kaj Ole Petersen,dum la jaroj 1872-1874.Ĝi anstataŭis alian malno van proksime starantan,konstruitan en la jaro 1748 de arkitekto Nikolai Eigtved.Sur la frontono staras monumento de Adam Öhlenschläger,tragia poet Skulptisto:H.V.Bissen,kaj mastro pri komedio Ludvig Holberg.Skulptisto: Theobald Stein.La nuna teatro staras sur la grundo de iama kanonfandejo.

36. Knippelsbro (La ponto de sinjoro Knippel)
Unua lignoponto estis konstruata dum la jaroj 1618-1620.La nuna ponto esta el 1937.Arkitekto:Kaj Gottlob.Ĝi funkcias kiel levponto,kun 2 klapoj. Larĝo de la ŝipiro:35 metroj,alto:5,4 metro.

37. Kongens Nytorv (La nova placo de la reĝo)
Ĝis la mezo de la XVIII-a jc. ĉi tie estis bazaro,kie oni vendadis fruktoj fiŝojn kaj aliajn varojn.Fine de la XVII-a jc.Frederiko la III-a ekkonstru modernajn domojn por riĉuloj.Lia filo Kristiano la V-a (1670-1699)starigis al si mem monumenton sur la centro de la placo.Skulptisto:Abraham Cesar L'Amoureux.Kristiano la V-a rajdanta,kaj la ĉevalo tretas la figuron kiu simbolas envion.La kvar figuroj ĉirkaŭ la piedestalo estas faritaj de la frato de arkitekto-Claude L'Amoureux:

- Aleksandro la Granda simbolo:bravo kaj nobleco.
- Herkuleso - forto.
- La diino Artemis - honoro kaj respekto.
- La diino Minerva - saĝo.

38. Kultorvet (La placo de karbo)
La nomo devenas de tiu tempo kiam oni vendis ĉi tie lignokarbon kaj torfon el la nordselandaj arbaroj.En la jaro 1728 ĉiuj domoj ĉirkaŭ la placo forbrulis.

39. Köbenhavns Hovedbanegard (La fervoja ĉefstacidomo)
Ĝi estis konstruata dum la jaroj 1904-1911.Arkitekto estis Heinrich Wenck. Ĝi estas ekipita per 12 peronoj.

40. Köbenhavns Radhus (La Kopenhaga Urbodomo)

Estis establita dum la jaroj 1892-1905.Arkitekto:Martin Nyrop.La stilo estas norda-itala-renesanca.Laŭdire la urbodomo en Sienna servis kiel mod lo por la Kopenhagan.La halo estas granda 1048 kvadratajn metrojn. Alto de la turo estas 107 metrojn.La sonoriloj aŭdigas ĉiun 15-an minuton inter la 8.00 kaj 24-a horoj.Sur la fasado de la urbodomo estas ora statu de la episkopo Absalon,la fondinto de la urbo (1167).Skulptisto:V.Bissen.

41. Köbenhavns Universitet (La Kopehaga Universitato)

La universitato estis establita en la jaro 1479 de Kristiano la I-a(1448-1481).Komence estis uzataj domoj,kiuj antaŭe funkciis kiel episkopaj ofic joj.Ili bone funkciis ĝis la incendio en la jaro 1728,kiam pereis ankaŭ la universitataj domoj.La nova ĉefdomo estis konstruata 1831-1836. Arkitekto estis Peder Malling.La stilo estas miksaĵo de klasikismo kaj got

42. Langebro (La longa ponto)

Kristian la V-a (1670-1699) ordonis konstruadon de ponto por piedirantoj; ĉefe por soldatoj patrolantaj la urbajn remparaĵojn.Post kelkaj jaroj oni pli larĝigis la ponton por preterpasantaj veturiloj.Dum la jaroj 1901-190 oni anstataŭigis ĝin per pli larĝa ponto turnebla.Dum la jaroj 1929-1930 oni konstruis pli modernan baskul-ponton,kiun danaj sabotistoj en la jaro 1945 eksplodigis.Fakte oni detruis nur la levmeĥanismon por malebligi al la germanoj for konduki diversajn danajn ŝipojn el la suda parto de la haveno.Finfine en la jaro 1954 arkitekto Kaj Gottlob faris desegnojn por la nuna ponto.Larĝo por preterirantaj ŝipoj estas 35 metroj. Libera alto de la akvo ĝis la fermita ponto estas 7 metroj.

43. Langelinie (La longa kajo)

Ĝi fakte estas promenejo inter la forteso laj la Sundo.En tiu areo estas kelkaj famaj monumentoj:

a. Monumento de princino Maria (1866-1931),edzino de princo Valdemar. Skulptisto:Carl Martin Hansen.Starigita en la jaro 1912.La princino estis nepino de la franca reĝo Louis Philippe.

b. Sur la gazono staras la Hvitfeldt-kolono,flankita de kanonoj kaj kugloj trovitaj en la Golfo de Köge (1710),el skeleta ŝipo,kiun la komandor-kapitano preferis eksplodigi kun ĉiuj viroj kaj varoj por ke ne falu en la manojn de la svedaj malamikoj.La monumento estis starigita 1886.

c. Den lille havfrue (la marvirineto)

La statuo estas financita en 1913 de la bierfaristo Carl Jacobsen. Skulptisto estis Edvard Eriksen,kies edzino estis modelo. Jacobsen mem trovis la lokon por situigi tie la marvirineton.

Daŭrigas sur la alia paĝo.

43. Langelinie - daŭrigo

d. Söfartsmonumentet (La maristo-monumento)
Ĉe la plezurboata haveno staras monumento pri la maristoj,kiuj perdis la vivon dum la Unua Mondmilito.Skulptisto estis Svend Rathsack.Nomoj de la pereintaj maristoj kaj ŝipoj estas ĉizitaj sur la monumento.

e. Mindesmärket for Danmarksekspeditionen til Nordöstgrönland.
Memorŝtono omaĝe al tiuj,kiuj pereis dum la gronlanda ekspedicio en la jaroj 1906-1907.Starigita en 1912.Skulptisto estis Kaj Nielsen.
Sur la ŝtono estis ĉizitaj la nomoj de la 3 partoprenantoj de la ekspedic

f. Isbjörn med unger (La polusa urso kun idoj)
Starigita ĉi tie la blanka urso estas simbolo de Gronlando.Skulptisto est
Holger Wederkinck.Starigita ĉe la maro en la jaro 1937.

44. Marmorbroen (La marmora ponto)
Konstruata dum la jaroj 1741-1745.Arkitekto Nikolai Eigtved.Du rokokaj pavilonoj,kaj la trotuaro el norvega marmoro estas ankaŭ de Eigtved.

45. Marmorkirken,Frederkskirke (La marmora preĝejo)
La unuan projekton por la Frederika Preĝejo ellaboris arkitekto Nikolai Eigtved lige al la urbo de Frederiko,omaĝe al la 3oo-jara jubileo de la re familio sur la dana trono.Oni komencis ĝin konstrui en la jaro 1749.
Post lia morto (1755)daŭrigis la laboron la arkitektoj Thurah kaj Jardin.
Pro manko de mono ĝi ĉesis 177o.Post 114 jaroj la financisto C.F.Tietgen aĉetis la ruinon en 1874.Li finkonstruis la preĝejon en la jaro 1894.
Lia arkitekto estis Ferdinand Mehldal,kiu senpage faris desegnojn por la preĝejo.La kupolo de la baroka preĝejo estas kopio de Sankta Petro en Romo

46. Nationalmuseet (La Nacia Muzeo)
Ĝi estis establita en la jaro 1892.Sektoro 1.kaj 2.konsistas el historia tempo ĝis la jaro 1600.
Sektoro 3 .ampleksas tempon post la jaroj 1600..
Sektoro 4.enhavas ekpoziciojn de ne-europaj kulturoj kaj kolektoj de antikvaĵoj.
Sektoro 5. enhavas kolekton de medaloj kaj moneroj.
Tiu muzeo ĝuas internacian famon pro sia kolekto de pratempaj artaĵoj,ĉefe skulptaĵoj el Egiptujo,Grekujo kaj Italio.La kolekto de etruskaj artaĵoj estas la plej granda en norda Europo.

En la muzeo estas organizataj konstante diversaj ekspozicioj.
Ĉiun merkredon je la 19.00 horo eblas senpage partopreni prelegon gvidata de la muzea kunlaborantoj.

47. Ny Carlsberg Glyptotek (La Gliptoteko)
Fondintoj estas Carl Jacobsen kaj lia edzino Laura (1897-1906).Arkitekto: Vilhelm Dahlerup. Tiu Muzeo enhavas antikajn verkojn kaj pentraĵojn.I.a. etruska arto kaj vico da famaj romiaj portretoj-kapoj.Krom tio francaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj de 1900 jaroj,ankaŭ verkoj de impresionistoj kaj de skulptisto Rodin.Krome la Gliptoteko havas belan kolekton de pentraĵoj Cezanne,Monet,Degat,Renoir kaj aliaj impresionistoj.Ekzemple Gauguin,van Gogh kaj Toulouse Lautrec.

48. Nyboder (La marista loĝ-kvartalo)
Establitaj de Kristiano la IV-a (1588-1648).La unuaj loĝejoj estas el la jaro 1631.Unu el tiuj servas hodiaŭ kiel muzeo.Dum la jaroj 1756- 1805 estis konstruataj pli da loĝ-domoj.

49. Nyhavn (La nova haveno_
Por la konvena kunligo de la maro al la urbo,Frederiko la III-a(1648-1670 ordonis ke oni elfosu kanalon en la jaro 1671 por la ŝipoj irantaj kun siaj varoj.La urbo-kamandanto Niels Rosenkrantz lasis siajn soldatojn fari tiun laboron.La unua domo ĉi tie konstruita estis, la palaco Charlott borg.Post multaj jaroj ĉi tie enloĝis artistoj kaj riĉuloj.

50. Nytorv (La nova Placo)
Laŭ la ordono Kristiano la IV-a oni establis en la jaro 1606 novan placon inter la Malnova Placo kaj la tria kaj kvara urbodomoj.La trian oni kostru ĉirkaŭ 1475.Rekonstruo okazis 1610.Ĝi forbrulis dum la granda urba incend en la jaro 1728.La kvara urbodomo en baroka stilo forbrulis en 1795.
De 1610 ĝis 1850 ĉi tie estis viando-merkato.Sur la placo staris dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj pilorio (kolono de malhonoro) al kiu oni katenis krimulojn por ilin bati,au brulstampi.

51. Prins Jörgens Gard (La korto de princo Georgo)
Ĉi tie troviĝas pordego kaj eniro al la Supra Tribunalo.En la korto staras statuo de Herkuleso(kun klabo),farita de la skulptisto Bertel Thorvaldsen. Tri ceteraj statuoj estis faritaj de Thorvaldsen kaj H.V.Bissen.
a. Minerva - diino de la arto kaj scienco - kun strigo.
b. Nemezo - diino de la venĝo kaj justa repago - kun rado.
c. Eskulapo - (Asklepio) - dio de la medicino - kun kuracista bastono.

52. Rosenborg slot (La kastelo de Rosenborg)
La somera rezidejo de Kristiano la IV-a.Devenas de la jaroj 1606-1607. Ĉirkaŭita de la Rosenborg-ĝardeno.Rekonstruata dum la jaroj 1613-1634 en nederlanda stilo kun altaj turoj.En la palaca trezorejo troviĝas la reĝaj insignoj kaj juvelaĵoj.

53. Runde Tarn (La ronda Turo)
Konstruita en la jaro 1642 kiel observatorio.En la jaro 1656 ĝi estis kunligita kun la preĝejo Trinitato.Arkitektoj estis:Kristiano la IV-a kaj Ha von Steenwinckel.Sur la turo estas inskribo:"Donu,ho Dio saĝecon kaj juste con en la kronata koro de Kristiano la IV-a".Laŭdire la rusa caro Petro la Granda rajde atingis la pinton de la turo en la jaro 1716,supren.

54. Sankt Albans kirke (La preĝejo de Sankta Albano).
Brita preĝejo.Konstruata dum la jaroj 1885-1887.Angla arkitekto:A.W.Blomfield.Aleksandra,filino de Kristiano la IX-a (1683-1909) edziĝinta al Edva la VII-a,fondis kune kun sia edzo tiun preĝejon por la britoj loĝantaj en Kopenhago.La interno estas bele ornamita per vitraj pentraĵoj kaj memortab loj honore al Aleksandra kaj Edvardo.*Sankta Alban la unua martiro en Angl senkapigita en la jaro 303 aŭ 304 pro sia kristana kredo en la urbo Verula num (hodiaŭ S.Alban).Super lia tombo oni starigis faman abatejon.

55 Sankt Ansgars kirke (La preĝejo de Sankta Ansgaro)
Ĝi estas la Rom-katolika ĉefpreĝejo en Danio.Estis konstruata dum la jaroj 1841-1842.Arkitekto estis Georgo Hetsch.Sur la fasado enskribo:"Dediĉita al Kristo,la Savanto".La kvin zinkaj figuroj en la niĉoj de la fasado montras de maldekstre jenajn gravajn Biliajn personojn:profeto Jesaja,Moseo,Davido, Aaron kaj profeto Elija.Statuo de Sankta Ansgaro skulptita de M.S.Elo,kun ekonomia apogo fare de Carlsberg.
*Sankta Ansgaro (801-865)misiisto,nomata ankaŭ "Apostolo de Nordio",monaĥo de Benediktina ordeno el norda Francio.Venis en 826 al Danio por misii inte la danoj.Li kreis unuan parokon en Birka apud Mälaren (Svedio) en la jaro 830.Li fondis preĝejon en Ribe kaj Hedeby apud Ŝlesvigo.

56 Statens Museum for Kunst (La Muzeo pri Arto)
Estis konstruata dum la jaroj 1889-1896.Arkitektoj:Vilhelm Dahlerup kaj Georgo E.W.Möller.Enhavas pentraĵojn el diversaj epokoj.

57 Ströget (La piedira strato)
Ĝi fariĝis piedira strato 1962.Tie oni trovas multajn luksajn butikojn, restoraciojn kaj bankojn plurajn magazenojn.Ĝi konsistas el:Frederiksbergg. Nygade,Vimmelskafet,Amagertorv kaj Östergade.Ĝi estas 800 m.longa.

58 Synagogen (La Sinagogo).
Konstruata dum la jaroj 1830-1833 de arkitekto Georgo Hetsch.Kvadratforma en egipta stilo.Interne tri-nava templo kun seĝoj por virinoj (supre),laŭ juda kutimo.Super la pordo jena enskribo:"Benata estu tiu,kiu venas en nomo de Dio".

59 Thorvaldsens Museum (La Thorvaldsen Muzeo).
La muzeo enhavas skulptaĵojn kaj aron da pentraĵoj donacitaj de Thorvaldsen ĉe lia reveno al Danio en 1838.Tiucele oni rekonstruis malnovan remizon kaj adaptis ĝin al muzeo dum la jaroj 1839-1847.La fasado estis farita laŭ la egipta arkitekturo.Supre setas videbla bronza figuro de la triumfa-diino en ĉaro tirata de kvar ĉevaloj,nomita kvadrigo.Skulptisto:H.W.Bissen.

60 Tivoli (La amuziĝparko Tivoli)
Estis establita en la jaro 1843 de la fondinto ĵurnalisto Georg Carstensen La nomo devenas de itala urbo proksime al Romo,kaj de distro-parko en Pariz( Ĉi tie funkcias ekde 1874 la pantomima teatro.La ĉina Turo(1900),koncerta salonego (1956),Tivoli-orkestro (1844).

61 Trinitatis kirke (La preĝejo Trinitato)
Estis konstruita en la jaro 1637,sed ekfunkciis kiel preĝejo en la jaro 1642.Romanika stilo.Oni supozas ke la arkitekto estas Hans von Steenwinckel Ĝi estis destinita por studentoj loĝantaj proksime al la preĝejo.

62. Universitets bibliotek (La Universitata Biblioteko).
Ĝi estis establita 1482.Forbrulis dum la kopenhaga incendio en la jaro 1728 Rekonstruita en la jaro 1860.Ĝi enhavas 550.000 volumojn.

63. Vor Frelsers kirke (La preĝejo de la Savanto)
Ĝi estis konstruata dum la jaroj 1682 1696 en nederlanda baroko stilo.Arkit Lambert von Haven.La preĝejo estas fidela kopio de la Roma preĝejo Sant'Ivc della Sapienza.La preĝeja turo havas spiralan spajron,ĝi estas el la jaro 1750.Ĉepinte estas orumita globo(diametro 2m)simbolo de la monda globo,kaj sur ĝi staras 3m.alta figuro de Kristo,la Savanto(kun venkstandardo).

64. Vor Frue Kirke (La preĝejo de Nia Sinjorino).
Ĝi estas fondita en 1190 de posteulo de Absalon,lia duonnevo Peder Sunesön episkopo en Roskilde.Ĝi estis kolegia preĝejo de katedralo en Roskilde. Dum la jaroj 1539-1917 ĝi servis rolon kiel universitata preĝejo.Ekde 1924 ĝi fariĝis katedralo.Je la kopenhaga incendio en 1728 forbrulis la preĝeja turo.En la jaro 1744 oni rekonstruis la turon je la alto de 112 metroj.Ĝi estis plej alta de la ĉefurbo.Sed en septembro 1807 ĝi estis detruita dum la bombardado de la angloj.La nuntempa preĝejo estas el la jaroj 1811-1828 kaj estas en klasikisma stilo.Arkitekto:C.F.Hansen.Sur la frontono en la timpanono estas la evangelisto Johano predikanta en la dezerto.

65. Zoologisk Have (La Zoologia Ĝardeno)
Ĝi estis fondita de zoologo Niels Kjärbolling en la jaro 1859.
Ĝi enhavas 300 specojn.I.a.ĝirafojn,leonojn kaj elefantojn.

Eugeniusz - Kopenhago